

Фёдор Сологуб,
Расточитель

Измотал я безумное тело,
Расточитель дарованных благ,
И стою у ночного предела,
Изнурен, беззащитен и наг.

И прошу я у милого Бога,
Как никто никогда не просил:
„Подари мне еще хоть немного
Для земли утомительной сил.

Огорченья земные несносны,
Непосильны земные труды,
Но зато как пленительны весны,
Как прохладны объятья воды!

Как пылают багряные зори,
Как мечтает жасминовый куст,
Сколко ласки в лазоревом взоре
И в лобзании радостных уст!

И еще вожденней лобзанья,
Ароматней жасминных кустов
Благодатная сила мечтанья
И певучая сладость стихов.

...

Фёдор Сологуб,
La disipulo
tradukita de Manfred Retzlaff

Stulte mi eluzis korpon mian,
Disipado estis tio ĉi,
Vidas elirejon mi nenian,
Nude, neŝirmite staras mi.

Kaj mi preĝas al la kara Dio,
-Tiel mi neniam petis Lin -:
“Donu Vi al mi da energio
iom, kiu plu vivtenos min.

Neporteblaj afliktiĝoj teraj,
Kaj tro granda tera vivopen',
Sed kontraŭe ĉarmoj primaveraj
Kaj freŝiga akva ĉirkaŭpren'!

Kiel ardas la purpur-aŭroroj,
Kiel igas revi la jasmen',
Kiel rave amas inaj koroj,
Kiel kisas lipoj kun ĝojplen'!

Kaj ankoraŭ ĉi kisas' pasia, 1)
Kaj jasmen-aromo tiu ĉi,
La revado forta, idilia,
Kaj de l' versoj dolĉa melodi'!

...

Фёдор Сологуб,
La disipanto
tradukita de Michel Duc Goninaz

Mi la korpon liveris al ŝimo,
Disipinte trezoron de l' sort'.
Jen mi staras ĉe la noktolimo
En nudeco, senhelpa, sen fort'.

Kaj mi petas de la Dia graco
— senkomparas la preĝa sincer'! —
“Nur iomon da forto donacu
Al mi, kiun lacigas la ter'.

Sub ĉi-teraj ĉagrenoj mi sklavas,
Por mi troas la tera plenum',
Sed printempoj min, ho kiom! ravas,
Kaj freŝigas min akva brakum'.

Kiom ruĝe aŭroroj ĉi ardas,
Kiel revas jasmena arbet',
Kiel milde lazuro rigardas,
Kiel kisas la lipa impet'!

Dezirata eĉ pli, ol kizado,
Kaj aroma eĉ pli, ol jasmen',
Estas forto de songa persvado
Kaj de versoj la milda refren'.

...

У тебя, милосердного Бога,
 Много славы, и света, и сил.
 Дай мне жизни земной хоть немного,
 Чтоб я новые песни сложил!“

*Verkinto de tiu ĉi Rusa poeto estas ФЕДОР СОЛОГУБ (Fjodor Kusmiĉ Teternikov, *1863-03-01 – †1927-12-05), publikigita 1917-06-13.*

Arg-385-757 (2007-02-06 16:46:33)

La vera nomo de la poeto estis: Фёдор Кузьмич Тетерников (Fjodor Kusmiĉ Teternikov), Фёдор Сологуб (Fjodor Sologub) estis lia kaŝnomo (pseŭdonimo).

Gloro kaj potenco estas via!
 Mi Vin petas, kompatema Di':
 Donu iom al vivtempo mia,
 Por ke pliajn kantojn verku mi!“

*Traduko de la Rusa poeto “Расточитель” de ФЕДОР СОЛОГУБ (Fjodor Kusmiĉ Teternikov, *1863-03-01 – †1927-12-05) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 2002-08*

MR-392-1a / Arg-385-758 (2007-02-06 12:17:32)

La vera nomo de la poeto estis: Фёдор Кузьмич Тетерников (Fjodor Kusmiĉ Teternikov), Фёдор Сологуб (Fjodor Sologub) estis lia kaŝnomo (pseŭdonimo).

Ĉar Vi, Di', kompatemas, kaj vere
 En Vi — gloro kaj fort', lumoflu'.
 Donu iom da vivo surtere,
 Por ke kantojn komponu mi plu!”

*Traduko de la Rusa poeto “Расточитель” de ФЕДОР СОЛОГУБ (Fjodor Kusmiĉ Teternikov, *1863-03-01 – †1927-12-05) en Esperanton de MICHEL DUC GONINAZ (*1933-09.06) en 2003.*

Arg-385-759 (2007-02-08 12:35:49)

Tiu ĉi traduko aperis en la revuo “La ondo de Esperanto”, en 2003. Laŭ sciigo de s-ro Michel Duc Goninaz, la verkinto de tiu ĉi traduko, mi, Manfred Retzlaff, korektis preseraron en la tria stofo, nome “printempo” anstataŭ ĝuste “printempoj”. S-ro Duc Goninaz atentigis min pri tio per retletero de l' 07.02.2007. Tiu preseraro ankoraŭ estis en la retejo <http://www.esperanto.org/Ondo/Ondo/106-lode.htm#106-36>, el kiu mi prenis la tradukon.